



La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia maja kunveno

Dato: Vendredon, la 19-an de majo 2006, 6:30-9:00 ptm

Loko: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Planado por la ELNA Kongreso en Novjorko.
Kunportu viajn demandojn pri kio, kiu, kie, kiam,
kiel, kia, kial, kiom kaj kies, kune kun viaj ideoj
kaj proponoj! ★

Protokolo de la kunveno de la 21-a de aprilo 2006

Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la 7-a horo, kaj bonvenigis ĉiujn. Entute ĉeestis 14 personoj, inkluzive nian gaston

Mikaelo BRONŝTEJN, kaj la filon de Sonja SOSKINA, Eŭgeno.

Stuart prezentis Mikaelon al la grupo, kaj poste la ĉeestantoj unuope prezentis sin.

La formala parto de la kunveno estis mallongigita, por doni pli da



tempo al nia gasto.

Tomaso anoncis, ke li bezonas volontulojn por kunvenaj prelegoj.

Sekvis la programo de la vespero. Mikaelo parolis al ni pri SEJM (la

Sovetia Esperantista Junulara Movado) kaj prezentis interesajn rakontojn kaj ĉarmajn kantojn pri ĝi kaj pri aliaj temoj. Li ankaŭ

kunportis librojn kaj KD-ojn, kiujn la ĉeestantoj povis aĉeti.

Je la 9-a horo Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE



Du Kantoj

Ni presas ĉi tie du popularajn kantojn, kiujn mi tradukis de la angla lingvo al Esperanto kaj kiujn ni jam kantis kune dum klubkunveno. ★

– Tom ECCARDT

Rivero

(laŭ la melodio de “Moon River”)

Rivero, kia via larĝo!
Mi transiros en bargo

Laŭ vi.

Reviganto, kor-rompanto,
Kien ajn vi iros, mi iros kun vi.

Ĉielarko, ie en la mondo,

De ĉiu vagabondo

La celo.

Mi veturas al la insulo

Kaŝita en nebulo

Malantaŭ la spegulo --

Rivera ĉiel. ★



Ho Daniel'

(laŭ la melodio de “Danny Boy”)

Ho Daniel', la tuboj kanton ludas
De valo al valo kaj laŭ la monta
flanko.

Somero forestas, kaj vintr'
apudas,

Atendos mi dum tuta via manko.

Revenu dum la neĝa vala sombro,

Prefere dum somera iluminado,

Ĉeestos mi en sunlumo aŭ en

ombro,

Ho Daniel', ho Daniel' mi amas

vin. ★

IBM Plaza

La sepan de majo 13 novjorkaj geesperantistoj neformale kunvenis ĉe IBM Plaza. Ni diskutis plurajn aferojn, inkluzive la okazontan ELNA kongreson en nia urbo en julio. ★

– Tom ECCARDT



Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Majo 2006

19

ESNY KUNVENO

Diskutoado pri la Landa
Kongreso de Esperanto en Novjorko
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Junio

4

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 pm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuadoj por Prismo 155)

ESNY Pikniko

Oni elektos daton kaj lokon dum majo.

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)
“IBM” Building Atrium
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

ELNA kongresos en Novjorko!

Post 11 jaroj de foresto, ELNA okazigos sian jarkongreson en nia Granda Pomo je la kvina fojo (21-24 julio). Kaj vi havos okazon grandiozigi ĝin! Ni jam elektis temon, kongresejon, dormejon, kaj komencis kun aliaj aferoj. Bonvolu veni al nia maja kunveno, kie mi klarigos kio restas, kaj kiel la kongreso povas profiti de viaj talentoj kaj vi povos profiti de la kongreso. ★

– Tom ECCARDT

Baldaŭ vizitos

Niaj malnovaj amikoj, Silvia Rotenberg kaj Carlos Uria vizitos Novjorkon en frua junio. Ĉu vi havas spacon en via domo por gastigi ilin? Se vi havas bonvolu kontakti min. Dankon. ★

– Tom ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Nijl Blonstein
(212) 410-3950

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 154 – Majo 2006
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuadojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York